

SVISA ESPERANTO - SOCIETO

INFORMAS

N-ro 6/1994

NOVEMBRO-DECEMBRO

A R T O en A R B A R O



La skulptisto Favre

Fritz Travis gigantanta morkelo

Jen ankoraŭ kelkaj impresoj pri la pentekostaj migrad-tagoj. "La arto en arbaro". Vere, unika impresoj, la skulptaĵoj fari-taj en arboj trunkoj.

Supre la bela kaj giganta morkelo kaj sur paĝo 10 la impona kameleono.

HEROLDO DE ESPERANTO

Ĝis nun HdE aperis en ses milionoj da ekzempleroj

GRAVA KULTURPREMIO AL "HEROLEO"

La germana Fondaĵo "FAME" asignis al "Heroldo de Esperanto" kaj al la verkistino Spomenca Štimec la kulturpremion 1994 (po 5000 markoj), pro ilia kontribuo al la disvastigo de kulturaj verkoj kaj subteno de internacia kompreniĝo.

La monda sendependa gazeto HdE (16 numeroj jare), fondita en Kolonjo en 1920 de Teo Jung kaj honorofice redaktata de 1961, de Ada Fighiera-Sikorska, ĝis nun aperis preskaŭ 1900 fojojn en pli ol ses milionoj da ekzempleroj entute: ĝi estas dissendata al ĉ. 70 landoj: multaj legantoj en neevoluintaj landoj ricevas ĝin senpage.

En sia 73-jara vivo, "Heroldo" eldonis ĉ. 100 Esperantolibrojn kun pli ol 20'000 paĝoj entute. Famaj fariĝis ĝiaj modernaj lernolibroj, plurfoje reeldonitaj, en: Esperanto, angla, hispana, franca kaj itala lingvoj: German-lingva lernolibro estas en preparo.

Antaŭ la milito, "Heroldo" estis malpermesita de la Gestapo kaj Teo Jung rifuĝis al Nederlando: en la postmilitaj jaroj la gazeto aperadis sinsekve en Scheweninghen (Nederlando), Bruselo (Belgio), Madrido (Hispanio kaj, nun, en Torino (Italio). -HdE-

K R I S T N A S K O 1 9 9 4



La estraro de la Svisa Esperanto-Societo kaj la redakcio de SES INFORMAS deziras al ĉiuj membroj kaj geamikoj solenan Kristnaskon.

La redaktoro de "SI" kore dankas al ĉiuj, kiuj regule sendis siajn kontribuaĵojn.

-Red FL-

PRIPENSINDA FAKTO

En la numeroj 2 kaj 4/1994 de SES INFORMAS legiĝis teksto pri la tutmonda kongreso de la Mondfederalistoj okazonta en Glarus en julio 94. Tiu teksto entenis alvokon al kunlaboremulo, kiu devus alporti al Glarus varbmaterialon pri Esperanto.

KCE jam antaŭe rilatis kun la organizantoj kaj ricevis de la tutmonda komitato permeson havi standon dum la kongreso.

Ĉar neniu anoncis sin, KCE duanfojon rilatis kun la svisa sekcio de Mondfederalistoj por demandi, ĉu ĝi pretus preni pakadon ĉe la poŝtoficejo en Glarus kaj surtabligi la enmetitajn informilojn en la kongresejo. Por la organizantoj tio ne eblis. De KCE Andy Künzli klopodia atingi eblajn alportantojn, sensukcese. La rezulto estas, ke neniu materialo pri Esperanto estis je la dispono de la kongresanoj.-MG-

oo0oo

MORTANONCO

En la maljunulejo "NEUBAD" (Basel) mortis la 1-an de septembro 1994 la longjara membro de SES **Heinrich Ringli**, en sia 92-a vivjaro.

Al la funebranta familio ni esprimas sinceran kondolencon.

En Esperantujo Heinrich Ringli restas en bona rememoro.

-FL-

oo0oo

M A Z I EN GONDOLANDO

Ĉiu svisa Esperantisto antaŭendu la profesionivelan Esperanto-vidbendan kurson "MAZI EN GONDOLANDO", ĉe internacia Esperanto-Instituto Rioustraat 172 NL-2585 HW Den Haag. -DR-

Rimarko de Tomasz Wacieczowski, estro de Tommy-eldonejo kaj reprezentanto de BBC-English en Varsovio, en intervjuo kun Andrzej Pettyn.:

"....la instruado de frazomodeloj kaj la instruado de bona prononco estas la celo de la vidbenda kurso de Esperanto "MAZI EN GONDOLANDO". Mi nepre volas substreki, ke laŭ la didaktika vidpunkto la vidbenda leciono de Esperanto estas perfekta. (El la tre ampleksa intervjuo) -FL-

oo0oo

NEKROLOGO PRI HEINRICH RINGLI

Ni funebras pri sinjoro Heinrich Ringli, mortinta la 1-an de septembro 1994. Li estis karega homo kaj mia persona bona interparolanto kaj Esperanto-instruisto. Dum mia ĉeesto lia koro finis sian aktivecon, post kiam ĝi ĉirkaŭ trimiliardofoje batis. La biologia koro ĉesigis sian servon, sed siaj spiritaj impulsoj pluekzistos.

Nur ekde ĉirkaŭ unu jaro mi vizitis lin preskaŭ ĉiusemajne, vendrede vespere, en la malgranda loĝ- kaj laborĉambro en la maljunulejo, kie ni en Esperanto parolis pri la plej diversaj temoj el la granda kaj eta mondo.

Li estis tre atenta aŭskultanto kaj konservis ĉion en sia memoro. Mi tre miris, kiel li ekzemple informiĝis pri la stato de miaj tri filoj. Li ankoraŭ ekzakte sciis la nomojn kaj vivdatojn.

Ni parolis pri politiko, kulturo, historio kaj la multaj vojaĝoj, ekzemple al la Esperanto-mondkongreso en Pekino. Li ŝatis tiun lingvon kaj li suferis, ĉar ĝi ne jam hodiaŭ estas instruata en la lernejoj, kiel neŭtrala pontlingvo.

Ankoraŭfoje antaŭ kvin semajnoj, okaze de mia lasta hejmvizito, li subite pritraktis la problemojn pri la estonta evoluo de la planlingvo Esperanto, kiu tiel forte estis kreskita je sia koro.

Li mem lernis Esperanton, kiam li estis 60-jara. En ekzamenoj li sukcese akiris la diplomojn de "ATESTO PRI LERNADO" kaj "SUPERA DIPLOMO". Ankoraŭ sur sia mortlito li ripetis al ni, per lasta forto, sian konatan deziron rilate al simpligo de la planlingvo. La plej lasta vorto, kiun mi ankoraŭ klare komprenis, estis en Esperanto "sufiĉe".

Sinjoro Ringli ne nur restos en mia memoro pro Esperanto-povoj. Estas kelkaj tipaj karakteraj trajtoj, kiujn mi konservos: Lia pripensema, mallauĝta kaj aminda voĉo, prompteco, ordemo, kapableco pri ekzakta aŭskulto kaj la mirinda memoro. Laŭ mia opinio li iomete similis al figuro, kiun desegnis la poeto Adalbert Stifter en siaj noveloj.


Ne nur ni Esperantistoj, sed ankaŭ la loĝantoj kaj la direkto de la maljunulejo "NOVBADO" kaj ĉiuj, kiuj konis lin, precipe ankaŭ mi, adiaŭis lin kun iom da melankolio. Adiaŭo de originala, unika, tre talenta kaj aminda homo. Mi kondolencas al la funebraj familioj ankaŭ nome de la Esperanto-Societo Basel. Sub la pordo ĉiusemajne estis la lasta vorto "ĝis revido". Nun mi diras lastfoje "ĝis revido", Sinjoro Ringli.

-Guido Appius-

**INTERNACIA
FESTIVALO**

la jarfina aranĝo por vi

11-a



27 dec 1994 - 3 jan 1995

por personoj 25-55 jaraĝaj
kaj junaj familioj

Sensenstein (FR Germanio)
(15 km oriente de Kassel)

Internacia Festivalo prezentas specifan programon por la "dua generacio" (mezaĝuloj) kaj junaj familioj kun aŭ sen infanoj, sed ankaŭ gejunuloj estas bonvenaj. IF okazas sub lerta gvido kun kompetentaj kunhelpantoj. Bonvolu atenti, ke IS, junulara aranĝo de GEJ, okazas samtempe, sed ne samloke.

Laŭ enketa rezulto la plimulto deziras jam nunan jaron reveni al Sensenstein: la klerigejo estas komforta kaj kompare kun aliaj domoj favorpreza, ĉiuj ĉambroj disponas pri duŝo/necesejo kaj estas familikonvenaj kun 2 - 5 litoj (viaj infanoj povas do dormi kun vi).

Nagejo, saŭno, gimnastikejo je via senkosta uzo!

Kassel/Sensenstein estas bone atingebla aŭtostrate kaj fervoje. Funkcios alventage "transporta servo" por trajnalvenantoj. En nia IF-Oficejo vi povos ŝanĝi viajn valutojn kaj aĉeti bildkartojn; etosoplena Esperanta Gastejo (jam fama kaj tradicia) estos je via ĉiutaga kaj -nokta dispono...

INTERNACIA FESTIVALO

NOTO:

Detalaj informoj kun aliĝilo estas riceveblaj ĉe la redakcio de SES INFORMAS.

-FL-

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

SEMAJNFINO 26-a - 27-a de novembro 1994

Studa semajnfino por progresantoj

kun **Nicole Margot** (Svislando), instruistino, romanda komitatanino de Svisa Esperanto-Societo. Ĉi-tiu kurso celas partoprenantojn, kiuj komencis lerni Esperanton kaj kiuj ŝatus progresi en ĝi, aŭde, lege kaj parole. La instruisto pretos respondi al ĉiuj iliaj demandoj.

Sabate vespere oni komune manĝos rakledon aŭ fonduon en Kultura Centro Esperantista. Dimanĉe tagmeze oni komune lunĉos en KCE aŭ en urba restoracio.

SEMAJNFINO: 26-a-27-a de novembro 1994

GEOGRAFIAJ NOMOJ EN SVISLANDO:

kun **Claude Gacond** kaj **Andy Künzli** (Svislando), interlingvistoj/esperantologoj.

Kvankam la problemo de la geografiaj nomoj en Esperanto estas malnova temo, ĉefe la lastatempa esplorado pri la planlingva movado en Svislando (fare de Andy Künzli) evidentigis unu gravan demandon: ĉu la nacilingvaj nomoj de urboj, vilaĝoj, kantonoj, riveroj, montoj, stratoj, placoj, ktp estu esperantigitaj, kaj se jes, ĝis kiu grado? La semajnfino revigligu la fakan diskuton kaj konstruu la bazon por la esperanta normigo de svisaj geografiaj nomoj.

Ĉi-tiun esperantologiecan semajnfino povos aktive partopreni ĉiuj interesuloj pri la temo.

Sabate vespere oni komune manĝos rakledon aŭ fonduon en Kultura Centro Esperantista. Dimanĉe tagmeze oni komune lunĉos en KCE aŭ en urba restoracio.

NOVJARA RENKONTIĜO

28a de decembro 1994 ĝis la 2a de januaro 95.

Per komunaj promenadoj, skimigradoj (se estos neĝo) lingvokurseto, distraj vesperoj kaj varmetosaj babiladoj, ni gaje saltos de unu jaro al la alia. Krom la silvestra vespero kaj manĝo, ankaŭ eblos dum la semajno iom serioze labori. Venu ferii kaj festi kun ni! La ferio-restadon gvidos responsuloj de KCE.

oo0oo

Daŭrigo de paĝo 1:

Bonega ideo de la arbar-posedanto, sinjoro Favre (bildo sur la titolpaĝo).



Kameleono kaj Kadka Aldona kaj André'e

Oni povus diri: Iom post ioma transformado de la arbaro al arta muzeo en la libera naturo.

Ankaŭ sur la supra bildo oni konstatas tion.

-FL-

oo0oo

GRUPAJ INFORMOJ

ESPERANTO-SOCIETO BASEL:

- 24.11.20.00h Monata kunveno en Riehentorhalle.
Lingva bankedo kun Claude Gacond:
Aperitivo: Priflora leksiko
Unua plado: Pika poemeto
Dua plado: Proza teksteto
Tria plado: paroligaj struktur-
ŝanĝoj
Deserto: Belaj lumbildoj pri
floroj sovaĝaj kaj ĝardenaj.
27.11.94. Zamenhofa festo (detaloj sekvos)

BELLINZONA: Ĉiam sabate, en Viale Motta 32.
12.11.17.00h kaj 11.12.17.00h.

ESPERANTO-SOCIETO BERN:

En restoracio AL FORNO, Spitalgasse 37.
1.11.19.30h kaj 6.12.19.30h.
Ni memorigas al niaj membroj, ne forgesu
niajn supre menciitajn datojn. Dankon.

ESPERANTORONDO BIELO:

Ĉiun vendredon en restoracio AMI, Freiestr.8
18.00h - 19.00h.

Lucerna esperanto-SOCIETO:

- 9.11.14.00-16.00h Paroliga kunveno en Big
Ben. Gvido Franz Brügger.
24.11.20.00h 1. Luise Bachmann legos el libro
2. KIEL INFORMADI la publikon
pri Esperanto kaj kiel efike
varbi por kurso? Parolos Paul
Scherer.
14.12.1994 Ĉiam merkrede, 14.00-16.00h
11.1. 1995 paroliga kunveno kun Franz
8.2. 1995 Brügger, en Big Ben.

esperanto-SOCIETO NEUCHÂTEL:

Ĉiunonate iun vendredon, laŭ ebleco de la
membroj.

| |
|---------------------------|
| AZB 8053 Zürich |
| PP/Journal 8053 Zürich |

IMPRESSUM

Mitglieder-Information Schweiz. Esperanto-Gesellschaft
 Aufgeber: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich
 Herstellungsort: Druckerei Gysin Zürich. 6x im Jahr.
 Red. Telefon 01/381 77 13

ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:

- 14.11.19.00h Monata kunveno en Karl der Grosse. Okazos prelego de Claude Gacond.
- 28.11.19.00h Libera kunveno ĉe familio Weidmann, Eisengasse 22, De la Haltejo Bellevue Tramoj 2 aŭ 4 ĝis haltejo Kreuzstrasse.
- 12.12.19.00h Zamenhofa festo ĉe familio Weidmann.

La estraro de la Esperanto-Societo Zürich deziras al ĉiuj membroj kaj geamikoj solenan Kristnaskon kaj ĉion bonan en la nova jaro

1 9 9 5

oo0oo

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

G r a v a p a r t o d e e s p e r a n t u j o
 V e n u

esperantiĝi - progresi - esperantumi - kongresi
 KCE PF 779 CH-2301 La Chaux-de-Fonds tel 039/27 74 07.

oo0oo

Limdato por kontribuaĵoj al SES INFORMAS 1/95 estas la 6-a de decembro 1994.